

Prononco

Unu el la plej gravaj avantaĝoj de Esperanto estas ĝia prononco. Evidente vi ĉiuj scias tion.

Eble por multaj homoj la esperanta prononco ne estas facila – simple ĉar la sonoj estas tre diferencaj de tiuj de ilia denaska lingvo –, kaj pro tio multaj esperantistoj ne prononcas la literojn tute korekte, sed pli-malpli kun akĉentoj, kiuj malkaŝas ilian devenon.

Tamen la fakto estas, ke la esperanta prononco ege facilas pro tio, ke ĉiu litero estas prononcata per ununura sono, kaj ĉiu sono estas reprezentata per ununura litero. Ankaŭ tion vi ĉiuj scias.

Malgraŭ tio mi volas - por tiuj, kiuj ne regas la anglan, francan, germanan aŭ/kaj portugalan - montri kelkajn malfacilaĵojn dum la lernado de tiuj lingvoj.

Ĉar la **angla** estas monde la plej lernata kaj uzata fremda lingvo, ĝi ofte estas citata kiel ekzemplo de la problemo de prononco. Do mi komencas per ĝi.

Eblus mencii dekojn da malfacilaĵoj (milojn da vortoj), sed mi montras nur malmultajn. Veras, ke ekzistas reguloj por la prononco, tamen por multegaj kazoj ne estas reguloj. Ekzemple:

La litero "u" estas prononcata kiel /u/ en la vorto "butcher", sed preskaŭ kiel /a/ en la vorto "butler".

"ea" povas esti /i/ (ekzemple en "lead") aŭ /e/ (ekzemple en "lead").

"o" povas estis /o/ (ekzemple en "not"), /oŭ/ (ekzemple en "go") aŭ /u/ (ekzemple en "do").

En la **franca** ekzistas pliaj prononcreguloj, sed:

- unue oni bezonas parkeri tiujn regulojn (ekzemple ke "au", "aux", "eau", "eaux", "aud", "aut" kaj "ot" estas prononcataj simple kiel /o/);

- due estas malfacilege skribi korekte, kiam oni aŭdas la sonon /o/, ĉar ĝi povas esti skribata "au", "eau", "eaux" ktp. – kaj evidente kiel "o" – en malsamaj vortoj.

Kiam mi estis instruisto de la **germana**, mi ĉiam diris al la gelernantoj, ke la prononco estas multe pli facila ol en la angla, ĉar ekzistas reguloj, kiujn oni povas lerni. Sed denove la fakto estas, ke ne facilas parkeri ĉiujn regulojn. Nur unu grava ekzemplo: la literoj "ch" devas estis prononcataj kiel /ĥ/ post la vokaloj /a/, /o/ kaj /u/, sed kiel /ĉ/ (sono, kiu ne ekzistas en Esperanto) post la vokaloj /e/ kaj /i/, kaj kiel /k/ antaŭ /s/.

En la **portugala** la sono /s/ povas esti reprezentata per la litero "s", per "c", per "ss", aŭ per ĉi-tiu litero: "ç". Ekzemploj: "sem", "cem", "assim", "açai". Aliflanke la litero "x" (ikso) prononciĝas /ŝ/ ("taxa"), /ks/ ("táxi"), /s/ ("extremo") aŭ /z/ ("exato").

Kiel mi diris, mi montris nur kelkajn malfacilaĵojn. Ekzistas multe pliaj. Kaj evidente

povus esti montrataj tiaj problemoj en la plejmulto da lingvoj.

Do - **VIVU ESPERANTO KAJ ĜIA PRONONCO.**